

Eric Macpherson Bailón

Epistemologiaj (kaj metodaj) konsideroj pri la studado de Historio de Esperanto

Resumo: Ĉi tiu esploro konsistas el tri partoj. Unue mi provas reliefigi la diferencojn kaj komplementecojn inter la esploristoj el diversaj fakoj koncerne esperatologion. Due mi provas (re)difini la lokon, kiun ĉi tiu subfako okupas en la kampo de homaj kaj sociaj sciencoj, same kiel mi pledas por tema kaj skala koncepto pri ili. Fine mi argumentas favore al kelkaj elementoj de metoda renovigo en la historio de la Esperanto-movado, kun kiel kaz esploro akademias Esperanto-eldonaĵoj en Hispanio dum la unua triono de la 20-a jarcento.

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Esperantologio; Epistemologio; Sociaj Sciencoj; Historio.

The Esperanto scholar is thus increasingly required to be familiar with a broad intellectual tradition which draws insights from pure and applied linguistics, psychology, sociology and many other fields. [...] Esperanto was a product of a particular moment in the intellectual history of northeastern Europe, a product also of a particular moment in the development of liberal Jewish thought in that region [...] It was also the product of a particular moment in the history of technology, and of economic history, when a new class of teachers, bureaucrats and minor business people was emerging, with the resources and the time to travel, and, of course, the technological means at their disposal.

(Esploranto de Esperanto do ĉiam pli devas koni larĝan intelektan tradicion kiu ĉerpas ideojn el pura kaj aplika lingvistiko, psikologio, sociologio kaj multaj aliaj kampoj. [...] Esperanto estis produkto de specifa momento en la intelekta historio de nordorienta Eŭropo, produkto ankaŭ de specifa momento en la evoluo de liberala juda pensado en tiu regiono. [...] Ĝi ankaŭ estis la produkto de aparta momento en la historio de tekniko, kaj de ekonomia historio, kiam aperis nova klaso de instruistoj, burokratoj kaj etkomercistoj kun la rimedoj kaj la tempo por vojaĝi, kaj, kompreneble, la teknikaj iloj je ilia dispono.)

(Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes 1996, 2)

1 Antaŭrimarkoj

Antaŭ ol enprofundiĝi en la enhavon, estas grave reliefigi, ke tio, kion mi prezentas ĉi tie, pli similas al laborskizo, ol al io pretiĝanta, ol al solida akademia esploro. La celo kuŝas en kolektado de iuj intuicioj, kiuj estiĝis dum la verkado de mia finekzamena projekto, kaj en provo strukturi tiujn ideojn en dialogo kun la ekzistanta literaturo. Fine mi celas proponi novajn kadrojn tiurilate. Tial, iuj ideoj, ankoraŭ evoluantaj, povas enhavi erarojn. Mi anticipu pardonpetas pro tio. Mi celas provi teorie sistemigi kelkajn relative nekonektitajn elementojn, kiujn mi observis kadre de ĉi tiu reduktita (sub)studfako, Esperantologio. Gravas ankaŭ klarigi la amplekson de mia pripensado. Esperantologio kovras vastan gamon de temoj, kaj multaj el ili superas miajn profundajn konojn. Tial mia celo ne estas nur provizi metodajn elementojn al ĉi tiu fako, sed ankaŭ pripensi la lokon, kiun ĝi povas okupi.

Tiu ĉi teksto ne pritraktos la tutajn studojn de Esperantologio, sed ĝi koncentriĝos specife pri ĝia historia aspekto: la (socia) historio de la Esperantomovado. Krome, mi celas situigi ĉi tiun studkampon en la pli vasta sfero de Esperantologio, uzante ankaŭ ĝian ekzemplon kiel platformon por pripensi la naturon de la sociaj kaj homaj sciencoj, kaj ankaŭ por dividi sociologiajn observaĵojn pri la temo.

Sekvante esplorlinion kiel pluraj faritaj en la lastaj jaroj en ĉi tiu sama revuo de aŭtoroj kiel Fians (2022), Tonkin (2022) aŭ Tonkin kaj Fettes (1996), mi celas kolekti aron da observoj, kiujn mi povis fari kaj per tio kontribui al la teoria sistemigo farata lastatempe pri Esperanto-studoj. Ni komencu per la observoj.

2 Esperantologio kaj Esperantujo: meritplena sed konfuza rilato

En ĉi tiun (sub)kampon mi lastatempe mergiĝis por identigi ŝancojn kontribui novajn alirojn al ĝia studo. Je ĉi tiu punkto mi volas, ke ni devus koncentriĝi al du kategorioj kiujn mi distingas, pli el sociologia ol epistema perspektivo. Se ni konsideras ke fako celas respondi demandojn, la speco de demandoj faritaj (kion oni demandas al si mem) neeviteble modulas kaj la respondojn kaj la naturon de la studobjekto. Jen kie mi observas riĉigan diferencon inter tiuj esploristoj, kiuj esploris unue (kaj ofte nur) Esperanton kaj tiuj, kiuj sekvis “eksterajn” kadrojn kaj sekve aplikis ilin al Esperanto.

Tiu ĉi distingo logike influis mian aliron dum la bibliografia superrigardado kaj analizo de la nuna stato de la arto. Ĉar la temo ne estas bone konata (en tradicia akademia mondo), mi elektis evoluigi miajn proprajn

kategoriigojn de bibliografiaj fontoj kiuj utilis al mi kiel teoria kadro de mia pripensado. La jena klasifiko celas substreki la aspekton de aparteno aŭ ne al “la Esperanto-komunumo”, ankaŭ konata kiel Esperantujo.

Subfako	Fundamenta intereso
Transnaciaj historiistoj	La transnacia dimensio de Esperanto en ĝia historio
Akademiuloj de apudaj fakoj	Studi Esperanton el iliaj fakoj, ofte konservante historian perspektivon
Amatora esperantologio	Dokumenti la agadon de “ĝiaj homoj”
Profesia esperantologio	Akademie studi Esperanton (inkluzive interalie ĝian historian perspektivon)

Tabelo 1: Tabelo rilatanta (sub)fakon kaj fundamentajn interesojn. Fonto: Memfarita.

Tiu ĉi klasifiko, espereble utila, baziĝas sur (instrumenta) uzado de la esperantologia kategorio por tiuj esploroj, kiuj venas el aktiva esperantismo. Gravas substreki, ke tiun ĉi dividon mi kreis laŭokaze por la Historio de la Esperanto-movado. Mi ne scias ĉu ĝi validus por aliaj dimensioj de Esperanto-studoj. (Ĝuste nun retrospektive mi verŝajne uzus alian nomon por la kategorio.) Kadre de tio, tamen, fundamentas la distingo inter “amatora” kaj “profesia” esplorado. Krome pro ĝia horizontaleco ĉi tiu (sub)studfako iom specialas. Kiel rimarkas la antropologo Guilherme Fians en sia artikolo “Kontraŭ la esceptismo en Esperanto(logio)”:

Se kaj membroj de Esperantujo kaj fakuloj pri Esperantologio estas rigardataj kiel fratoj en granda rondo familia, indas eviti malkonsenton kaj fervorajn debatojn inter ili, ĉu ne? Pro tiuj trajtoj, Esperantologio firmiĝas kiel komforta medio kie fakuloj – ne nepre pri lingvaj kaj humanistikaj temoj, ne nepre doktoroj aŭ doktoriĝantoj – estas ĝenerale bonvenaj. La kerna postulo por kontribui al tiu studkampoj estas havi ion fakecan por diri pri Esperanto – eĉ se nur surbaze de onia memsperto. Tio aldonas kroman komplikon tavolon al tiu pejzaĝo: estas fajna distingo inter esperantologoj kaj Esperanto-aktivuloj, kio foje rezultigas pli entuziasme subtenajn kaj malpli rigorajn fakalirojn pri Esperanto-rilataj temoj. (Fians 2022, 115)

La ĉefa punkto, al kiu mi volas atenti, rilatas unuflanke al la horizontaleco de la akademia mondo pri Esperanto-temoj kaj aliflanke al la konfirmo de la influo pri la elekto de temoj, kiun havas aktiva partopreno en la movado. Teorie ĉi tio ne nepre devas influi la kvaliton de esplorado kondiĉe, ke sufiĉaj filtriloj estas kreitaj.

Por ilustru la argumenton per kelkaj ekzemploj el inter la fontoj kaj aŭtoroj kiujn mi pritraktis (ĉefe por la hispana kazo), bona ekzemplo estas la esploroj de la politika sciencisto Javier Alcalde, kiuj iras de lingva justeco (Alcalde 2018) ĝis la rilato inter la anarkiisma movado kaj Esperanto en siaj originoj (Alcalde 2021). Alia ekzemplo, verŝajne la plej konata koncerne la historion de Esperanto, estas la historiisto Ulrich Lins (2016) kaj lia verkaro pri la subpremado suferita de esperantistoj kaj Esperanto. Kiel dirite, la fakto ke ambaŭ apartenas al Esperantujo ne signifas ajnan perdon de objektiveco (aŭ ĝia aserto) sed simple rimarkebla diferenco en la elekto de demandoj kaj eĉ kelkaj metodoj, kompare al aliaj pli “eksteraj” esploristoj.

La praktika internaciismo, la pacismo de la movadanoj, ĝiaj internaj debatoj, la ligoj de Esperanto en sia historio kun iuj ideologioj, la subpremado, kiun suferis la esperantistoj... Jen tre malsamaj demandoj ol tiuj, kiujn ofte demandas al ni la esploristoj de la neesperanta sciencistaro.

(Tiu ĉi punkto en si mem postulus esploron por povi kvantigi tion, sed kiel dirite, la intenco de ĉi tiu pripensado estas malfermi novajn vojojn, ne montri jam fintraktitajn rezultojn.)

Tre utila ekzemplo de neesperantista esperantologo estas Roberto Garvía (2015), kiu en sia *Esperanto and Its Rivals* donas al ni brilan ekspozicion pri la kialoj, kiuj ebligis la venkon de Esperanto super aliaj “konlingvoj” (konstruitaj lingvoj). Tamen, tiu ĉi demando, t.e., la granda demando pri la universaligo de la uzado de Esperanto, estas relative “ekstera” al la kutimaj internaj elementoj de la esperanta kulturvivo. Mi atingis tiun konkludon post iom da observado kaj pripensado, kaj poste mi trovis similan aserton en lastatempe aperinta Tonkina artikolo:

Kaj kompreneble estas ankaŭ verkoj kiuj konsideras la Esperanto-movadon pure elekstere, precipe en la kunteksto de la internacilingva ideo (Garvía 2015; Gordin 2015), (...). (Tonkin 2022, 90)

Ĉi tiu fakto, kvankam ekzistas pli sistemaj studoj pri la afero (pri kiuj mi kompreneble konas), ebligas al mi emfazi, ke temas pri eslorenda studlinio.

Mi ankaŭ volas emfazi tion, ke la ekzemploj, kiujn mi ĝis nun uzis, ŝajnas al mi sufiĉe ilustraj, sed la ĉefa kialo por ĝia uzo ĉi tie estas ke ilin mi plej bone konas, kaj ili ja povas utili por klarigi mian argumenton, ne ĉar ili estas la solaj tiaj. Mi certas, ke la leganto povus aldoni plurajn aliajn esplorojn tiurilate.

Ĉiukaze mi konsideras, ke la ideo relative klaras kaj povas utili por lumigi unuan esplorlinion, pli sociologian, favore al la plur-/transfaka esplorado, tiel konfirmante la tian realecon de Esperatologio, kaj kiel fako kaj kiel studobjekto.

Mi ŝatus pri ĉi tiu esplorlinio (kaj pri la specifa subfako kiun mi konas, nome la [socia] historio de la Esperanto-movado), defendi la laboron faritan de tiuj fakuloj el fakoj apudaj/frataj/helpaj/najbaraj de historio (sed kun potenca historia komponanto).

Kaj, siavice, la mensaj kadroj kaj la speco de demandoj proponitaj de ĉiu fako estas ege riĉigaj (al tio ni revenos poste). Alia bona ekzemplo de interesa esplorado kadre de fakoj najbaraj al historio estas tiu de la geografo Denis Eckert pri la disvastigo de la unuaj Esperantaj vortaroj (Eckert 2022).

Aliflanke, ĉi tiu konstato kaj/aŭ distingo, kiun mi faras, ne havas ambicion preter la simple priskriba, tute male. La ideo, kiun mi volas ĉi tie defendi, estas, ke ĝuste la plibonigo de la speco de demandoj, kiujn ĉiu homo el sia parta “fono” povas fari kiuj riĉigas la temon/studobjekton.

Jen almenaŭ la impresoj, kiun mi ricevis el la kongresoj/laborrenkontiĝoj kiujn mi partoprenis lastateme de Esperanto Paradigma (s.d.) okazintaj sub la aŭspicioj de la Franca-germana Universitato (Université Franco-Allemande). Fians (2022) pravas kiam li sugestas ke oni devas atentigi la bezonon alfronti malsamajn perspektivojn por progresigi la fakon. Mia opinio, pluralaj iniciatoj kiel tiu, kiun mi ĵus menciis, metas la unuajn fundamentojn por mult/transfaka dialogo el kiu, espereble, aperos sistemo.

Mi alvenas al la unua konkludo/tezo de ĉi tiu teksto: la transfaka kaj plureca debato pri esplorprofiloj riĉigas la eblecojn de la (sub)fako.

Nun, kiam ĉi tiu demando relative klaras, gravas argumenti ankaŭ el alia perspektivo, nome epistemologio. Interalie tio povas utili kiel lumigilo, kiel ekzemplo por aliaj (sub)fakoj. Simile Guilherme Fians (2022) emfazas sian opozicion al la partikularismo de Esperanto-studoj. Konsentante kun la plejparto de liaj asertoj, mi ja konsideras grave substreki tiujn esceptajn pozitivajn elementojn en ĉi tiu studkampo, ĉar ĝuste ili ebligas doni retrosciigon al aliaj fakoj. Ni pridiskutos tion en la sekva sekcio de ĉi tiu teksto.

3 Repensi la sociajn kaj homajn sciencojn helpe de esperantologio

Rosa Luxemburg (1925, 1) iam nomis politikan ekonomion stranga afero, same ni povus fari per Esperantologio. Ĝia eneca (hiper-)plurdisciplineco kune kun tiu miksaĵo de alta specifeco kaj larĝeco kiuj formas ĝin estas nur kelkaj el la kialoj. Tial indas fari kelkajn demandojn pri ĝia naturo.

Kio estas esperantologio? Ĉu ĝi estas homa scienco? Ĉu ĝi estas socia scienco? Al kiu studkampo el la du ĝi apartenas? Ĉu ĝi estas kampo en si mem? Kio diferencas ĝin de aliaj (sub)fakoj?

Ĝuste en ĉi tiu punkto aperas la bezono povi pripensi de malsupre supren, de la konkreto ĝis la ĝeneralo, pri la kadroj de esperantologio, pri la naturo mem de la sociaj kaj homaj sciencoj. Kaj nur tiam, eble, ni povos kompreni la lokon, kiun Esperantologio povas (kaj devas) okupi en ili ĉiuj.

Por tio, mi opinias, estas konvene daŭrigi la argumenton uzante la dividon, kiun la filozofo Gustavo Bueno (1972) faris pri la sciencaj fakoj. Malgraŭ ke liaj teorioj ne estas tre konataj ekster la hispanlingva sfero, temas pri interesa teorio de la scio, kiu povas utili por starigi la bazojn de nia teoria kadro.

Gustavo Bueno, pli ol pri la sciencaj fakoj, brilas en sia klarigo pri tio, kio konsistigas fakon. Tiurilate fundamenta elemento en lia sciteorio estas la difino pri kio konsistigas sciencon. Ĉi tiu koncepto estas la kategoria fermo.

Kategoria fermo estas nenio alia ol la kapablo de fako produkti siajn proprajn elementojn kaj kategoriojn sufiĉajn por doni signifon al sia propra fako ene de si mem, sen neceso aliri aliajn fakojn. Tiu ĉi koncepto, kvankam komplika, estas tre grava en la sciteorio de Bueno.

Tio estas relative simpla en kelkaj sciencoj, precipe natursciencoj kiel fiziko kaj kemio, kiuj havas multajn proprajn elementojn, kaj en la kampo de formalaj sciencoj kiel matematiko. Sed ĉio fariĝas pli komplika kiam ni eniras en la kampon de sociaj kaj homaj sciencoj.

Ĉi tie mi volas reveni al la ideo de la kialo de etikedo, t.e. la kialo de la difino de kategorio kaj la du distingoj, kiujn ni faras en la kampoj de scio. Kaj ne estas kategoriaj fermoj en la sociaj sciencoj kaj homaj sciencoj.

Tial fari disiĝojn je ontologia nivelo en la homaj kaj sociaj sciencoj ne havas sencon, sed ĝi povas havi signifon el aliaj perspektivoj, kiel tiu de la faka divido de universitato kaj eĉ la kombinaĵoj de fakoj kiuj konsistigas la akademian programojn.

Tio estas tiel, se ni supozas skalan koncepton de la realo, en kiu la plej granda grupo estas la homaj kaj sociaj sciencoj, kiuj estas tre varia griza skalo. Ni povas funkcii ene de tiu ĉi grupo sub multe pli specifaj temaj perspektivoj, kiuj ebligas al ni ataki la studobjekton en la plej konkreta kaj plureca maniero ebla.

Por fari tion, mi proponas novan koncepton, ne ekskluzive de la teorio de kategoria fermo: la poran kategoriecon/duonmalfermitan kategoriecon.

Se ĝuste ne ekzistas ebla kategoria fermo, tio implicas grizskalon, eteran kontinuaĵon, kiu ne pravigas la diferencojn inter la partoj, kiuj formas ĝin en la ontologio-gnoseologio, sed en aliaj elementoj. Tio havas multajn

sekvojn, ĉar se la apartigo ne estas ontologia, ĝi devas esti pravigita per sia propra logiko. Tiu logiko dum la 20-a jarcento havis multe da rilato kun la profesiigo de la fakoj.

Siavice, la grizoj estas tiom diversaj unu de la alia, ke la disiĝo relative facile montras la nuancon de grizoj (ĉi-kaze, la metodoj, fontoj, kunteksto, naciaj tradicioj...). Ni vidas kiel ĉi tiu logiko enkadriĝas en kunteksto de specialiĝo kaj labordivido kaj, tamen, kiel ni estis avertitaj dum jardekoj, multe de la plej utilaj esploroj venis de multifakaj aliroj al demandoj/temoj.

Pri tio, unu el la plej brilaj teoriuloj de la sociaj sciencoj, la sociologo Immanuel Wallerstein diras la jenon koncerne la ekzistantajn dividojn en sia enkonduko al la 1-a volumo de la moderna mondsistemo:

Cuando uno estudia un sistema social las líneas de división clásicas entre las ciencias sociales carecen de sentido. La antropología, la economía, las ciencias políticas, la sociología – y la historia – son divisiones de la disciplina en cuestión, ancladas en una cierta concepción liberal del Estado y su relación con sectores funcionales y geográficos del orden social. Tienen un cierto sentido si el centro de nuestro estudio son las organizaciones. No tienen absolutamente ninguno si el centro de nuestro estudio es el sistema social. (Wallerstein 1974, 48, citita el la hispanlingva versio de la libro)

(Kiam oni studas socian sistemon, la klasikaj dividlinioj inter la sociaj sciencoj havas neniun sencon. Antropologio, ekonomio, politika scienco, sociologio – kaj historio – estas dividoj de la koncerna fako, ankritaj en ia liberala koncepto de la Ŝtato kaj ĝia rilato kun funkciaj kaj geografiaj sektoroj de la socia ordo. Ili havas sencon se la centro de nia studo estas organizoj. Ili havas absolute neniun sencon, se la socia sistemo estas la centro.)

Ni havas la burokratian fakan apartigon, pri kiu Wallerstein parolas. Pri tio (kio estas la tema strukturo de scienco) Ladislav Tondl diras al ni:

But such a division of labour (and also necessary cooperation) is based on predominantly pragmatic reasons. The thematic structure of the individual disciplines of the humanities is therefore determined more in terms of problems than materially oriented spheres. Of a small significance are certain traditions, established by the institutional structures operating in the systems of intellectual and professional training. A highly important aspect of the classification, specialization and thematic orientation of the individual branches of the humanities is the variable structure of accepted and acknowledged goals, needs and preferences. (Tondl 1998)

(Sed tia labordivido (kaj ankaŭ la necesa kunlaboro) baziĝas sur ĉefe pragmataj kialoj. Tial, la tema strukturo de la diversaj fakoj de la homaro estas determinita pli laŭ problemoj ol en sferoj de materia orientiĝo. Malmulte gravas certaj tradicioj, establitaj de la instituciaj strukturoj, kiuj funkcias en la intelektaj kaj profesiaj trejnadsistemoj. Tre grava aspekto de la klasifiko, specialiĝo kaj tema orientiĝo de la malsamaj branĉoj de la homaro estas la varia strukturo de akceptitaj kaj agnoskitaj celoj, bezonoj kaj preferoj.)

Aliflanke, jam fine de la 80-aj jaroj ni trovas, ke Dasgupta menciis ion, kion ni povus nomi la triunuo de Esperanto-studoj:

Without taking on the herculean job of reconciling the apparently conflicting views in the three domains in general, a scientist who wishes to study Esperanto culture may need to juxtapose (if “combine” is too strong a word, connoting successful synthesis) at least what the three enterprises have to tell us about universality in communication and language. (Dasgupta 1987, 319)

(Ne alprenante la herkulan taskon repacigi la ŝajne konfliktajn opiniojn en la tri domajnoj ĝenerale, sciencisto, kiu deziras studi Esperanto-kulturon, eble bezonos apudmeti [se “kombini” estas tro forta vorto, kio signifas sukcesan sintezon] almenaŭ tion, kion la tri entreprenoj povas diri al ni pri universaleco en komunikado kaj lingvo.)

Kaj, sen malkonsenti kun la aŭtoro, se ni atente rigardas, la tri kategorioj havas (laŭ mi) konsiderindan historian dimension.

Lingvistiko	→ Historio de Esperanto, ĝia disvastigo kaj lernado.
Kulturstudoj	→ Historio de Esperanto-kulturo.
Esperanto-movado	→ Socia historio de la movado, ĝiaj organizaĵoj, agoj kaj eldonaĵoj.

Ĉi tie malfermiĝus la debato kun la aŭtoro pri tio, ĉu al ĉi tiu triunuo mankas kvara elemento, aŭ ĉu ĉiuj tri havas sian historian dimension komune. Tamen mi konsideras, ke estas el komprenado, kio povas kaj ne povas esti esperantologio, ke oni povas ankaŭ pripensi la naturon kaj taksonomion de la sociaj kaj homaj sciencoj.

Por fari tion, mi proponas fari instrumentan disigon, sen eskapi de kategoriigo, sed ne distingi per metodoj, sed prefere instrument-tema.


Tio ekestas kiel logika sekvo de la vidpunkto, kiu komprenas la eteran spacon de la homaj kaj sociaj sciencoj kiel kontinuaĵon de griza, kiel dialektikan kontinuaĵon.

En ĉi tiu kontinuaĵo kiu intervalas de klasikaj studoj ĝis kvanta socia scienco, ajnan kampon aŭ subkampan disciplinon malfacilas distingi de la

resto. Kaj kvankam preninte du elementojn el la ekstremoj de la kontinuaĵo oni vidas malmultajn similecojn unuavide, estas vere sammaniere, ke la kreado de kategorioj, kiuj distingas tiujn, obeas pli al la sociologia-organiza bezono kategoriigi ol al klara ontologia fundamento.

Tamen, ni ne devas ignori la ekziston de tiuj disiĝoj ĉar, kiam instituciigitaj kaj eternigitaj, ili fariĝas gravaj.

Sub ĉi tiu perspektivo, kiun mi proponas, ni povas percepti tri skalojn de realeco por la sociaj kaj homaj sciencoj, kiuj povus esti grafike klarigitaj jene:



Tabelo 2: Rilato inter eldonejo kaj nombro de eldonaĵoj. Fonto: memfarita.

Ni do havas tri skalojn kaj du nivelojn.

La ontologia kaj sociologia niveloj obeas la difinon de ontologia kiel al io kio fakte estas kaj tion ni pravigus per la Teorio de Kategorio Fermo kaj pora/duonmalferma kategorienco, dum la sociologia nivelo obeus la komunan logikon de konstruismaj kaj instituciismaj aliroj al studado de la efikoj de la kreaĵoj de/en la socio pri tio.

Sur ĉi tiu lasta nivelo, la sociologia, ni trovas la kategoriojn kaj ĉefe la metodikajn dividojn (kaj kun ĝi la antaŭjuĝojn) kiujn la sociaj kaj homaj sciencoj havas koncerne sian historian evoluon en la akademia mondo. Tamen, ne koincidi ĉiukaze kun la dividoj neniel malhelpas, ke la scioj kaj metodoj ellaboritaj de tiuj instituciigitaj fakoj estu uzataj flue, konstante kaj eĉ ideale kun retrosciigo.

Tiam ni havus la tri skalojn. La skalo de la kategoria kampo de homaj kaj sociaj sciencoj, kun ĝia pora kaj griza dialektika kontinuaĵa konduto unuflanke. Tiu kontinuaĵo situus sur la ontologia ebena.

Due, ni havus la tradician klasifikon de la disciplinoj de la homaj kaj sociaj sciencoj kiuj obeas la sociologian-institucion nivelon en sia disiĝo. Kaj finfine, ni havas la laŭokazan skalon.

Ĝuste el tiu ĉi laŭokaza skalo, kiu funkcias de la kontinuaĵo sen ontologiaj pretendoj en kategoriigo, kiun ni povas permesi al ni disdividi (de metodika plureco supozita baza deontologio kaj la deviga vojo de ĉiu esploristo) ... esplori per temoj. Tiel, la tasko de la esploristo ne fariĝas apliki specifajn metodojn al la temo, sed prefere la tasko fariĝas adapti la metodojn al la temo. Se estas donita ankaŭ la skalara malsupereco de tiuj kategorioj en la kategoria aro de homaj kaj sociaj sciencoj, ni povas ankaŭ permesi al ni limigi, kaj limigi ĉiam pli, pli grandajn specifaĵojn, sen rezigni la maksimumon de la kontinuaĵo.

Tio estas, malfermiĝas vojo laŭ kiu ni povas enprofundiĝi en ĉi tiun metodikan taskon (pluralan kaj samtempe specifan) kiel virton kaj esplori kaj ekspluati ĝin maksimume.

Unu el la virtoj, kiujn mi vidas en ĉi tiu kadro, estas, ke ĝi sukcesas enigi plurecon en la deontologion de la esploristo.

Tio, kion mi ĵus menciis en la abstraktaĵo, mi kredas, eble estas iom el la fadeno, kiun ni uzas por sistemigi la grandegan diversecon, kiu studas tiun ĉi temon, kiun ni nomas historio de Esperanto, kiu, siavice, estas unu el la kruroj de Esperanto.

Supozi plurecon en la deontologio de la esploristo, enprofundiĝi en la metodojn, postuli la (sub)disciplinon. Tiu intuicio estas la vojo, evidente ene de la tuta esperantologio.

Ĉi tie aperas la demando pri kiaj novaj metodoj estas aplikataj... kaj kvankam mi havas intuiciojn pri tio, kiel iuj kvantaj metodoj povus esti utilaj, kiel mi memorigas vin, tio estas evoluanta laboro. Mi do procedas mal-konstrui kelkajn simplajn elementojn, kiuj laŭ mi povas helpi profundigi la komprenon de la historio de la Esperanto-movado.

Eĉ se estas longa vojo, la nombro da ciferecigitaj publikaĵoj same kiel tiuj, kiuj estas en la procezo de ciferecigo, donas al ni esperon pri la potencialo.

Ĝuste estas simpla kvanta laboro kun ciferecigitaj fontoj, kiu povas malfermi pordojn ĝis nun fermitajn al la disciplino.

4 Ekzemplo kun ilustra kazesploro: Esperanto-eldonaĵoj en Hispanio

Mi donos tre limigitan ekzemplon, kiun mi uzis en mia finekzamena projekto por ilustrati la punkton kaj emfazi, ke granda parto de la eblecoj, kiujn la ciferecigo de dosieroj malfermas al ni, estas tre bazaj analizoj kaj kun tre malalta teknika malfacileco. Principe, ili reprezentas baron al eniro por neniu, sed ili povas helpi nin prilumi dubojn, kiuj apenaŭ povas esti solvitaj “hermeneŭtike”. Ekzemple, disvastiĝinta kredo ĉe la politika maldekstro pri esperantismo estas, ke la granda plimulto de ĝi estis asociita kun la ekstrema maldekstro kaj la laborista movado.

Tiu ĉi aserto, kvankam bazita sur la vero, malfermas multajn same aŭ proporcie pli gravajn aspektojn de la Esperanta publika agado, kiuj do estas ombritaj. Tio distordas la retrospektivan percepton de la tuta Esperanto-movado.

Tamen ekzistas relative simpla maniero por kontroli kaj/aŭ refuti la forton de tiu ĉi ligilo/konekto, kiu estas analizi la enhavon de la eldonaĵoj mem.

Por la hispana kazo en la unua triono de la 20-a jarcento, kiu estis tiu, kiun mi studis, mi kreis tre modestan datumbazon kun informoj pri la 22 ciferecigitaj esperantaj periodaĵoj, kiujn mi povis trovi.

Dank’ al tio mi povis rapide empirie kontroli plurajn elementojn.

Unue, la forto de la kataluna esperantismo ene de la tuta Hispanio, kaj ankaŭ la grandega denseco de eldonaĵoj en la 1930-aj jaroj antaŭ la Civila Milito.

Loko de publikigo	Nº
Barcelono (Katalunio)	9
Madrido (Kastilio)	4
Zaragozo (Aragono)	2
Cádiz (Andaluzio)	2
Bilbao (Eŭskio)	1
Valencio (Valencio)	1
Jaca/ĥaka (Aragono)	1
Sabadell (Katalunio)	1
Santander (Kastilio)	1

Tabelo 3: Rilato inter eldonejo kaj nombro de eldonaĵoj. Fonto: memfarita.

- Procento de katalunaj publikaĵoj super la nacia totalo: **45,45%**

Aldone al tio, mi faris klasifikon de la eldonaĵoj laŭ ilia speco de enhavo. Por fari tion, mi kreis la tipologion laŭ la plimulto de la malsamaj enhavo:

- (1) **Interna** (propagando de la lingvo, kursoj, asocioj, kontaktoj, novaĵoj pri esperantismo).
- (2) **Art-literatura** (poezio, bildstrioj, bildoj...).
- (3) **Politika** (laboristaj aferoj).
- (4) **Miksita 1** (interna + literatura).
- (5) **Miksita 2** (literatura + politika + interna).

Sekvante ĉi tiun simplan dividon, mi klasifikis la ĉefajn ciferecigitajn revuojn kaj gazetojn disponeblajn. Jen la rezultoj:

Publikiga tipo	Nº
1. Interna	5
2. Art-literatura	5
3. Politika	2
4. Miksita 1	9
5. Miksita 2	1

Tabelo 4: Rilato inter publikiga tipo kaj nombro de eldonaĵoj. Fonto: memfarita.

Tio montras, ke, male al tio, kion oni povus komence pensi, nur 3 el la 21 ciferecigitaj periodaĵoj traktis laboristan temaron je substanciaj niveloj (tipoj 3 kaj 5). La plejparto estis okupita de kultura disvastigo, en la larĝa signifo de la esprimo. Ĉi tio, preter la evidentaj antaŭjuĝoj pri la konservado de fontoj, helpas nin movi al malsama, iom malpli idiografa (tendenco multe precizigi ĝian analizon), mikromaniero interpreti la dokumentojn je nia dispono.

Aliaj elementoj, kiuj laŭ mi ankaŭ ilustras ion gravan, kiam oni parolas pri esperantismo, estas la diferencoj pri la kvantoj de eldonaĵoj laŭ ilia aparteno al asocioj. Ĉar Esperanto estas perfekta ekzemplo de bone teksita reto, kun alta “socia kapitalo” (kiel multoblaj ekzemploj montras al ni), elprovi la forton de tiu ĉi hipotezo per la eldonaĵoj ŝajnas interesa afero.

Por fari tion mi limigis min al tre simpla ekzerco: kompari mezan kaj mez-nombran kvanton da publikaĵoj por tiuj kiuj estis kaj por tiuj kiuj ne estis de asocieca matrico. La rezultoj surprizos plurajn legantojn:

/	NE de asocioj	Mezumo (ambaŭ)	De asocioj	Procenta ŝanĝo super la meznombro
Meznombro	4,8	49,45	62,58	+26,55%
Mediano	2	31,5	50	+58,7%

Tabelo 5: Datumoj pri ŝanĝo en publikigdaŭro. Fonto: memfarita.

La procentaj ŝanĝoj estas sufiĉe grandaj por, se ne konkludi, almenaŭ konjekti ke la organiza formo havis rimarkindan influon sur la efiko kaj reproduktado laŭlonge de la tempo de la publikaĵoj. Se ni rigardas la variadon inter tiuj de asocioj super tiuj kiuj ne estis de asocioj, ni vidas **neatendita grandskalajn diferencojn inter 1.500 kaj 3.000%**.

Alia grava elemento estas la proporcioj. El la supraj 22 publikaĵoj, 17 (77%) apartenis al asocioj. Alia kurioza fakto por emfazi rilatas al eldondatoj. La jaro en kiu la plej multaj eldonaĵoj estis fonditaj estas 1931 (4 eldonaĵoj). Tio povas ŝajni logika kiam oni asocias la alvenon de la hispana respubliko al antaŭa kultura leviĝo.

Per ĉi tiu ekzemplo mi ne intencas eltiri grandiozajn konkludojn, sed nur kontroli la laboreblecojn, kiuj malfermiĝas al ni, kiam ni aplikas aritmetikan laboron pri publikaĵoj komprenataj kiel analizunuoj.

Kaj ĉi tio esence pro du kialoj:

- Profiti la altan nombron da ciferecigitaj dokumentoj.
- La grandega simpleco kaj efikeco de la analizoj, eĉ konsiderante konservado-biasojn.

Per tio mi ŝatus lasi kelkajn demandojn/proponojn, kiuj povus uzi ĉi tiujn metodojn kaj tiel riĉigi la disciplinon. Unu ideo povus esti mezuri la kvanton de dokumentoj laŭ eldonlokoj en eŭropa kaj tutmonda skalo, kaj la uzadon de terminoj kiel “paco”, “espero”, “pacismo” kaj “internaciismo” en la teksta korpuso de la ciferecigitaj arkivoj en la kolekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Oni povas ankaŭ vidi la frekvencon de diversaj specoj de eldonaĵoj en makroskalo kaj ĝia evoluado laŭlonge de la tempo por analizi la evoluon de la Esperanto-movado. Ankaŭ la demando pri sukceso/malsukceso de diversaj eldonaĵoj depende de diversaj variabloj enkadriĝas ĉi tie. Per similaj teknikoj oni povus mezuri la forton de la laborista esperantismo rilate al ĝiaj

eldonaĵoj, kompare al tiuj de la “neŭtrala” esperantismo, kaj tiel esplori la sociologiajn diferencojn inter eldonaĵoj en Esperanto. Resume, oni povas diri, ke restas multe da utila laboro farinda.

5 Konkludoj kaj konsideroj

Konklude, esperantologio havas en sia naturo kaj la elementojn por ne solidigi sin, kaj ankaŭ sufiĉe da elementoj por fari tion, kaj per tio montri al aliaj epistemaj komunumoj, ke ekzistas aliaj eblaj sciencaj kaj akademaj kulturoj, for de multaj el la malvirtoj de la nuntempa hegemonia paradigmo.

Tamen, ĝuste pluraj el tiuj elementoj de malsama akademia kulturo malhelpas la potencialon de la fako. Kiel Guilherme Fians argumentas en sia artikolo “Kontraŭ la esceptismo de Esperanto(logio)”, ke mankas debato en ĝia studo:

La plej karakteriza trajto de tio estas ke Esperantologio grandparte firmiĝas sur la maniero per kio la interkompreniĝa etoso de Esperantujo fariĝas interkonsentiĝo inter esperantologoj. Tiu faka spaco bazita sur interkonsentiĝo kontrastas kun la modernaj perspektivoj pri scienca disvolviĝo. Sociologoj kaj filozofoj ofte argumentas ke la sciencoj progresas pere de konsentoj, malkonsentoj, revolucioj, polemikoj kaj disputoj. (Fians 2022, 119)

Tamen, kvankam mi konsentas pri kelkaj aspektoj kun Fians, mi ankaŭ konsideras, ke ĝuste ĉi tiu deziro al konsento evitis kelkajn el la plej oftaj malbonoj de la burokratia-faka disiĝo en sociaj kaj homaj sciencoj. Konsentante kun tio, kion proponas la aŭtoro, mi kredas, ke ĝuste tiu ĉi malforto ankaŭ povas esti ĝia plej granda virto.

La respondo, laŭ mi, devas esti duobla. Unuflanke, estas pli ol evidente, mi eĉ dirus neforigebla, ke disputo kiel mekanismo utilas kaj utilis por progresigi la scion. Tamen tio ne malebligu, ke ni povu analizi la fenomenon en ĝia tutaĵo kaj per tio vidi, ke ĝi ankaŭ utilis por krei (almenaŭ en iuj kazoj) pli da limoj ol necese inter branĉoj de la scio.

Tial el tio mi deduktas, ke unu el la punktoj, en kiuj mi plej kredas, ke esperatologio povas reveni “al la fakoj ĉe kiuj ili originis”, kiel ĝuste diras Fians (2022, 108) en la menciita artikolo, estas en sciado provizi tiun dozon de, ni nomu “produktiva konsento”. Permesu malkonsenton kaj kolizion de ideoj kiel bazon, sed el komuna kaj neforigebla plurisma bazo, kiu ebligas transdoni la etikajn virtojn de la internacia lingvo al tiu esplorkampo. Temas pri malfacila vojo, nome manieroj de funkciado malsamaj de tiuj de la tradicia akademio. Tamen, tio ne nepre devas esti malhelpo. La bazoj jam ekzistas por profundigi la kreadon de epistemia komunumo, kiu helpu ne

nur al la strukturo de malgranda studobjekto, sed ankaŭ al la monstro de tio, kio povas esti multfakeco.¹

Analizitaj fontoj

Arkivo de la planlingva fako kaj Esperanto-muzeo de la Österreichische Nationalbibliothek (ÖNB) en Vieno.

Ciferecigitaj fontoj de Biblioteca Nacional de España (BNE).

Ciferecigitaj dosieroj provizitaj de profesoro Roberto Garvía Soto.

Bibliografio

Alcalde, Javier. 2018. "Linguistic Justice: An Interdisciplinary Overview of the Literature." En *Language Policy and Linguistic Justice: Economic, Philosophical and Sociolinguistic Approaches*, redaktis Michele Gazzola, Torsten Templin kaj Bengt-Arne Wickström, 65-149. Cham: Springer.

Alcalde, Javier. 2021. "Vides paralelas: esperanto i anarquisme als Països Catalans." *Kataluna Esperantisto*, kajero 370: 28-38.

Alcalde Villacampa, Javier. 2022. *Esperanto i anarquisme: els orígens (1887-1907)*. Barcelona: Edicions Malcriàs d'Agràcia. https://www.researchgate.net/profile/Javier_Alcalde2/publication/359617466_Esperanto_i_anarquisme_els_origens_1887-1907/links/62455cae57084c718b77f4ef/Esperanto-i-anarquisme-els-origens-1887-1907.pdf (18.03.2024).

Alcalde Villacampa, Javier kaj Jordi De Miguel. 2022. "Anarquistas y esperantistas comparten ideales." *Público*, Cultura 22.05.2022. https://bitoteko.esperanto.es/jspui/bitstream/handle/11013/6867/20220522_P%C3%BAblico.pdf (18.03.2024).

Anderson, Margo. 2007. "Quantitative History." En *The Sage Handbook of Social Science Methodology*, redaktis William Outhwaite kaj Stephen P. Turner, 246-263. London: Sage Publications.

Bueno, Gustavo. 1972. *Ensayos Materialistas*. Madrid: Taurus.

Dasgupta, Probal. 1987. "Toward a Dialogue Between the Sociolinguistic Sciences and Esperanto Culture." *Language Problems and Language Planning* 11, kajero 3: 305-334.

1 Krom la citita literaturo dum la ellaborado de ĉi tiu artikolo mi konsultis la publikaĵojn Sil (2000), Anderson (2007), Struck (2019), Garvía (2021), Alcalde Villacampa kaj De Miguel (2022), Macpherson Bailón (2022) kaj Fiedler (2023).

- Eckert, Denis. 2020. "The First Mini-Dictionaries in Esperanto (1887–1890). An Original Multilingual Corpus for Comparative and Interdisciplinary Research." HAL archives-ouvertes n-ro 02555912. <https://halshs.archives-ouvertes.fr/halshs-02555912> (18.03.2024)
- [Esperanto-Paradigma]. s.d. Transnationale emanzipatorische Praktiken/Les pratiques transnationales émancipatrices. <https://esperaparadigma1.sciencescall.org/>(18.03.2024).
- Fians, Guilherme. 2022. "Kontraŭ la esceptismo de Esperanto(logio): unuapaŝa etnografia aliro al tiu studkampo." *Esperantologio/ Esperanto Studies* 11, nova serio 3: 108–131. <https://doi.org/10.59718/ees72194> (23.04.2024).
- Fiedler, Sabine. 2023. "Kiel Esperantologio kontribuas aŭ povas kontribui al aliaj fakoj." *Esperantologio/Esperanto Studies* 12, nova serio 4: 8–14. <https://doi.org/10.59718/ees35716> (23.04.2024).
- Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and Its Rivals: the Struggle for an International Language*. Pittsburgh: University of Pennsylvania Press.
- Garvía, Roberto. 2021. *Lengua y utopía: el movimiento esperantista en España, 1890–1936*. Granada: Universidad de Granada.
- Lins, Ulrich. 2016. *Dangerous Language: Esperanto under Hitler and Stalin*. Tradukis Humphrey Tonkin. London: Palgrave Macmillan.
- Luxemburg, Rosa. 1925. *Einführung in die Nationalökonomie*. Berlin: E. Laub.
- Macpherson Bailón, Eric. 2022. "Recenzo de *Esperanto i Anarquisme: els origins (1887–1907)*, de Javier Alcalde Villacampa." *Sociología Histórica* 12, kajero 1: 289–292.
- Sil, Rudra. 2000. "The Division of Labor in Social Science Research: Unified Methodology or 'Organic Solidarity'?" *Polity* 32, kajero 4: 499–531.
- Struck, Bernhard. 2019. "Project: Esperanto & Internationalism, c. 1880s–1930." St Andrews School of History. <https://standrewsschoolofhistory.wordpress.com/2019/12/10/project-esperanto-internationalism-c-1880s-1930/> (18.03.2024).
- Tondl, Ladislav. 1998. "What Is the Thematic Structure of Science?" *Journal for General Philosophy of Science* 29, kajero 2: 245–264.
- Tonkin, Humphrey. 2022. "Esperanto: esploraj prioritatoj." *Esperantologio / Esperanto Studies* 11, nova serio 3: 86–107. <https://doi.org/10.59718/ees62843> (23.04.2024).
- Tonkin, Humphrey kaj Mark Fettes. 1996. *Esperanto Studies: an Overview*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. (Esperanto document, 43A).

Wallerstein, Immanuel. 1974. *The Modern World-System. Capitalist Agriculture and the Origins of the European World-Economy in the Sixteenth Century*. New York: Academic Press.

Pri la aŭtoro

Eric Macpherson Bailón (nask. Zaragozo, 2001). Licenciita pri Historio kaj Politika Scienco ĉe Universitato Carlos III de Madrido, li nuntempe studas Ekonomian Historion (magistrec) ĉe la Universitato de Bayreuth, Germanio. Liaj esplorinteresoj intervalas de la socia historio de Esperanto ĝis Geopolitiko, Ekonomia Historio kaj Epistemologio.

Retadreso: ericmacph@gmail.com

About the author

Eric Macpherson Bailón (born Zaragoza, 2001). Graduated in History and Political Science at the University Carlos III of Madrid, he is currently studying Economic History (MA) at the University of Bayreuth, Germany. His research interests range from the Social History of Esperanto to Geopolitics, Economic History and Epistemology.

Sobre el autor

Eric Macpherson Bailón, nacido en Zaragoza, 2001 y Graduado en Historia y Ciencia Política por la Universidad Carlos III de Madrid, actualmente cursa estudios de Historia Económica (máster) en la Universidad de Bayreuth, en Alemania. Sus intereses de investigación van desde la Historia Social del Esperanto hasta la Geopolítica, la Historia Económica y la Epistemología.

Epistemological (and methodological) considerations on the study of the History of Esperanto

Abstract: This research paper consists of three different parts. In the first part I try to highlight the differences and complementarities between researchers from different areas in Esperantology/Esperanto Studies. In the second part, I attempt to define and redefine the place of this sub-discipline in the field of human and social sciences, as well as to argue for a thematic and scalar conception of it. Finally, I argue in favour of some elements of methodological renewal in the specific field of the history of the Esperanto movement, taking as a case study Esperanto publications in Spain during the first third of the 20th century.

Keywords: Esperanto; History; Epistemology; Esperanto Studies; Social Sciences

Consideraciones epistemológicas (y metodológicas) sobre el estudio de la Historia del Esperanto

Resumen: Esta investigación consta de tres partes diferenciadas. En la primera intento resaltar las diferencias y complementariedades entre investigadores de diversos departamentos en cuanto a Esperatología. En la segunda parte, intento definir y redefinir el lugar que ocupa esta subdisciplina en el campo de las ciencias humanas y sociales, así como abogo por una concepción temática y escalar de las mismas. Finalmente, argumento a favor de algunos elementos de renovación metodológica en el campo específico de la historia del movimiento esperantista, tomando como caso de estudio las publicaciones esperantistas en España durante el primer tercio del siglo XX.

Palabras clave: Esperanto; Historia; Epistemología; Esperantología; Ciencias Sociales